# Tabelo de la korelativaj vortoj

| | **i-** ◆ (nedifina) | **ti-** ☞ (montra) | **ki-** ? (demanda) | **ki-** ⇔ (rilatiga) | **ĉi-** ✧ (tuteca) | **neni-** ∅ (nea) |
|---|---|---|---|---|---|---|
| **-o** (o-vorto) | io | tio | kio | kio | ĉio | nenio |
| **-u** (pronomo) | iu | tiu | kiu | kiu | ĉiu | neniu |
| **-u** (adjektivo) | iu | tiu | kiu | kiu | ĉiu | neniu |
| **-a** (a-vorto) | ia | tia | kia | kia | ĉia | nenia |
| **-al** (kaŭzo) | ial | tial | kial | kial | ĉial | nenial |
| **-am** (tempo) | iam | tiam | kiam | kiam | ĉiam | neniam |
| **-e** (loko) | ie | tie | kie | kie | ĉie | nenie |
| **-el** (maniero) | iel | tiel | kiel | kiel | ĉiel | neniel |
| **-es** (posedo) | ies | ties | kies | kies | ĉies | nenies |
| **-om** (kvanto) | iom | tiom | kiom | kiom | ĉiom | neniom |

Ĉe pluraj aŭtoroj kaj multaj parolantoj la **a-ema** fundamenta vort-elemento **ali/a**, kies **e-formo ali/e** fakte devus signifi **ali-maniere**, tendencas esti konsiderata kiel apartenanta al la tabelo de la korelativaj vortoj. Tiam en tiu lingvo-uzo la vorto **ali/e** fakte signifas **ali-loke**. Pro tio, por eviti miskomprenojn, la vorton **alie** plej ofte anstataŭas la formoj **ali-maniere** kaj **ali-loke.** Ĉe tiuj lingvo-uzantoj, pli kaj pli mult-nombraj, oni renkontas la vort-kombinojn **aliu, alial, aliam, aliel** kaj **alies**, kiuj signifas: **iu alia, alia kaŭzo, en alia tempo, alimaniere** kaj **de alia persono**.